

posteuloj de d-ro Schulhof ĝis nun. La sortoj estis interesaj kaj malfacilaj, ĉefe dum la dua mondmilito. Iuj informoj estis al ni nekonataj kaj la prelego alportis multajn novaĵojn.

L. Haki

Esperanta kastelo Greziljono en 2023!

2023-maj-06, 14h [Membrojarkunveno ĝenerala](#) kaj komitatkunveno dimanĉe

2023-maj-22/26 Dediĉo de verkoj

2023-jul-02/07 4-a [Verda Naturisma Semajno](#) kun [INOE](#)

2023-jul-07/17 7-a [Maratona Esperanto-kurso](#) kun *Mikaelo Bronŝtejn, Radojica Petrović, Szilva Szabolcs, Andrea Bertrand, ILEI-ekzameno*

2023-jul-07/17 35-a [Internacia E-Konferenco](#) post OSIEK pri variaj temoj

2023-jul-18/25 96-a Kongreso de [SAT](#)

2023-jul-25/aŭg-04 13-a Festa Semajno por infanoj kaj familioj

2023-jul-25/aŭg-04 44-a Renkonto de Esperanto-Familioj [REF](#)
Esperanto-Kulturdomo

<gresillon@gmail.com>



E-rondeto en Mladá Boleslav



Ni kunvenas regule ĉiumerkrede de la 10-a horo, en la Centro de volontuloj (konata kiel Klementinka), en la strato Václav Klement 601/13, invitataj estas kaj esperantistoj kaj ne-esperantistoj.

En februaro okazis du aranĝoj por publiko. La 15-an de februaro ni kunvenis por prezenti nian komunan laboron pri tradukado de „fabeloj el la tuta mondo“. La anoj legis dekon da mallongaj rakontoj el libretoj, kiujn eldonis J. Drahotová. La fabelojn oni povas aŭskulti ankaŭ aŭdioforme, en interpreto de infanoj el Havířov; la aŭdiolibro estas akirebla ĉe adreso:

<http://www.youtube.com/watch?=wsU8WvFDAVY>

La 22-an de februaro okazis prelego de nia amiko Jiří Blažek el Brandýs nad Labem, kiu jam rakontis en Klementinka pri siaj vojaĝoj en Japanio kaj Koreio. Nun li rakontis pri vojaĝo al Armenio kaj Kartvelio en la pasinta jaro.

Ĉestu ankaŭ vi, venontfoje! Informiĝu ĉe:

J. Drahotová, telefono 720652320 drahotova@esperanto.cz

Alvoko kontribui al la kongresa temo de la 108-a UK en Torino: Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj

En ĉiuj epokoj de la historio homoj migris de unu regiono al alia, de unu lando al alia – ĉu por trovi lokon por kultivi teron kaj nutri sian familion, ĉu – en la nuntempo – por studi aŭ labori. Homoj kun diversaj kulturaj fonoj, kun diversaj gepatraj lingvoj kunvivas en la sama loko, tiel homaj valoroj kunfluas kaj kontribuas al la pluevoluigo de socioj. Migrado estas inspiro, ne nur por la homoj, kiuj migras, sed ankaŭ por tiuj, kiuj renkontos la migranton kiel novan najbaron.

Multaj esperantistoj riĉigis siajn vivojn per propra migrada sperto. Jam la eklerno de la internacia lingvo Esperanto estas la unua paŝo por esti preta renkonti homojn kun alia gepatra lingvo, alia kultura fono. Kelkaj esperantistoj elektis vivon en aliaj landoj kaj mem fariĝi parto de la socio kaj kulturo de la nova lando.

Samtempe, pli kaj pli ofte homoj estas devigataj forlasi sian hejmon. Ili fariĝas migrantoj kontraŭvole – pro milito, pro mizero, pro danĝero. Ili ne povas resti en siaj hejmlokoj, sed devas fuĝi. En la jaro 2022 la nombro de rifuĝintoj tutmonde unuafoje superas cent milionojn, laŭ la statistiko de la UN-suborganizo por rifuĝintoj, UNHCR.

Tiujn temojn ni diskutos dum la 108-a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en Torino, Italio, inter la 29-a de julio kaj la 5-a de aŭgusto 2023. La urbo Torino estas taŭga gastiganto por tiu Kongresa temo – en Torinon enmigris miloj da homoj por labori en la industria produktaĵoj. Ni lernos pri la situacio

de enmigrantoj en Torino kaj en Italio en la pasinteco kaj en la nuntempo. Ni studos la fenomenon de migrado en aliaj mondopartoj. Ni krome analizos la temon el pli vasta, naturscienca vidpunkto: Migrado ĉiam estis fonto de evoluo kaj progreso: migrado de plantoj, de bestoj, de homoj. Kaj fine, ni intencas analizi, kiun rolon ludu la Esperanto-movado por solvi problemojn estiĝantajn pro migrado aŭ por migrantoj.

Ni invitas ĉiujn esperantistojn lertaj aŭ spertaj pri la temo “migrado” kontribui al la programo. Eble vi mem migris al alia lando kaj pretas raporti pri viaj spertoj. Aŭ vi subtenas migrantojn kiuj venis al via mondoparto kaj vi pretas dividi tiujn viajn spertojn kun la kongresanoj. Reĝisoro de la Kongresa temo estas Thomas Bormann, ĵurnalisto el Germanio, esperantisto de post la 70-aj jaroj. Bormann vivis dum pluraj jaroj en Turkio kaj en Grekio por raporti el tiuj landoj por germana radio-reto “ARD”. Ofta temo por li estis la situacio de la multaj rifuĝantoj kiuj trapasis aŭ restis en Turkio respektive Grekio. Por kontakti la reĝisoron pri la kongresa temo, skribu al KongresaTemo@groups.io – interesatoj ankaŭ povas aktive partopreni la diskutliston.

Ĉiuj estas invitataj aliĝi al la 108-a UK per reta aliĝo: uk.esperanto.net/2023 antaŭ fino de la dua aliĝperiodo je la la 31-a de marto 2023. El la Gazetaraj Komunikoj de UEA

BET ĉi-jare en Latvio – interesa!

De la 15-a ĝis la 22-a de julio 2023 en la havenurbo Ventspils en Latvio okazos la 57-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-57). Baltiaj Esperanto-Tagoj laŭvice okazantaj en Latvio, Estonio kaj Litovio jam ekde 1959 estas la plej signifa

Esperanto-aranĝo de tiu regiono kaj jam delonge ĝin partoprenas ne nur esperantistoj el la tri Baltiaj ŝtatoj kaj apudaj landoj, sed el multaj aliaj Eŭropaj landoj kaj eĉ el aliaj kontinentoj.

Ĉi-jare estas la vico de Latvio kaj Latvia Esperanto-Asocio elektis Ventspils kiel urbon de BET-57. Ĝi estas unu el la plej prosperaj urboj de Latvio, populara turisma centro kaj ripozloko ĉe la Balta Maro. Ventspils estas la sesa plej granda urbo de Latvio (pli ol 37 mil loĝantoj), situas 188 kilometrojn for de la ĉefurbo Rigo en la nord-okcidenta parto de Latvio. BET-57 funkcios en ejoj de la Teknika Lernejo de Ventspils, la partoprenantoj loĝos en la Studenta hotelo de la lernejo. La programo de BET enhavos diversnivelajn Esperanto-kursojn, enkondukan kurson en la latvan lingvon, Someran Universitaton, espereble AMO-seminaron kiu jam estas akceptita, vastan kulturen programon, ekskursojn, kvizojn, kantojn, dancojn kaj aliajn aranĝojn.

Foto en la PDF. Pli detalan informon kaj retan aliĝilon trovu en la hejmpaĝo de Latvia Esperanto-Asocio www.esperanto.lv.

Bonvenon al BET-57, bonvenon al Latvio!

Margarita Želve

Mesaĝo de UEA okaze de la internacia tago de la gepatra lingvo, la 21-an de februaro 2023.

La Internacia Tago de la Gepatra Lingvo estis intencata por emfazi la gravecon de gepatra lingvo en lernejinstruado. Infanoj lernas plej bone per lingvo, kiun ili plene komprenas, sed tro ofte ili ricevas instruadon en iu alia lingvo, kiun ili pli malbone komprenas, se entute. Rezulte, ili malmulton lernas, perdas interesiĝon pri kleriĝo, kaj ne povas bone navigi en la moderna ekonomio. Lastatempa studo de la Monda Banko konstatis, ke preskaŭ 37 procentoj de lernantoj en landoj de malalta aŭ meza enspezo estas instruata en lingvo, kiun ili ne komprenas. Lingvaj rajtoj kaj la rajto al edukado estas nedisigeble ligitaj. Per respekto al ĉiuj lingvoj, oni akcelas unuecon inter diverseco kaj internacian kompreniĝon. Krome, kultura kaj lingva diverseco estas fundamentoj por daŭripovaj socioj.

Lingvoj ludas gravan rolon en evoluigo, se uzataj por progresigi kulturenan diversecon kaj interkulturenan dialogon. Per lingvoj oni povas plifortigi kunlaboron, edukadon, inkluzivecon, kulturenan heredaĵon, sciencon kaj politikan partoprenon. Toleremo kaj respekto estas la vojoj por tiuspeca evoluigo. Plej grave: per utiligo de lingvoj efike kaj kompreneme oni antaŭenigas edukadon, kulturenan partoprenon kaj ekonomian prosperon.

Ni memorigas pri la tri principoj de Unesko rilate al lingvo kaj edukado: Instruado en Gepatraj Lingvoj (konstrui sur ekzistanta scio); Multlingva Edukado en Ĉiuj Niveloj (egaleco); kaj Interkulturena Edukado. Tiuj principoj celas samtempe konstrui altkvalitan edukadon kaj antaŭenigi pacajn sociojn kun plena respekto inter ties membroj. Lingvoj transdonas kaj konservas kulturojn kaj sciojn kaj kulturena interŝanĝo riĉigas nin ĉiujn. Kiel asocio kiu laboras por la solvado de lingvaj problemoj en internaciaj rilatoj kaj faciligo de internacia komunikado, UEA

aliĝas al la alvoko de Unesko, ke ĉiuj landoj favoru konservadon kaj protektadon de ĉiuj lingvoj uzataj de la popoloj de la mondo, inter ili la indiĝenaj lingvoj, kiujn oni aparte atentis en la nuna Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj.


El la Gazetaraj Komunikoj de UEA

Vi povas trovi Gazetarajn Komunikojn en la retejo de UEA: uea.org/aktuale/komunikoj La rekta ligilo por la komunikoj: <https://uea.org/gk/1093>

El la redakcio:

Estimataj gesamideanoj, karaj geamikoj, jam en la jaro 2017 dum la 7-a AEH-kongreso en Hodonín ĉe Kunštát ni konsentis, ke ĉiuj membroj devas pagi la kotizon (abono por Informilo kaj Antaŭen) plej malfrue ĝis la fino de la monato marto por koncerna jaro.

Ni tre dankas al ĉiuj, kiuj jam pagis la jarabonon.



Mirka kaj Ludmila

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. +420 721 537 970
e-mail: aeh@esperanto-ah.eu interreto: www.esperanto-ah.eu
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka, číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**

IBAN: CZ352010000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX

La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)

Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)

Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.

Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z

La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.